# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-26 n-ro 397

# Honkongo: batita hejmlaboristino ricevas 100 000 dolarojn da damaĝkompensoj




Israelo sin retiros el Unesko

Submaraj kabloj por savi la vivon

Kristnaskaj Paĉjoj are bicikladis

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Honkongo: batita hejmlaboristino ricevas 100 000 dolarojn da damaĝkompensoj
*Sklavigita hejmlaboristino p. 03*

Israelo sin retiros el Unesko
*Antaŭ la fino de 2017 p. 04*

Kristnaskaj Paĉjoj are bicikladis
*Kiuj partoprenis ĉiujn veturadojn, tiuj gajnis biciklojn p. 04*

Submaraj kabloj por savi la vivon
*Mildigi la efikojn de la naturaj katastrofoj p. 05*

Antaŭkristnaska vespero
*"Militpaŭzo" de 1914 p. 07*

Hodiaŭe
*Alejo Carpentier p. 07*




# Honkongo: batita hejmlaboristino ricevas 100 000 dolarojn da damaĝkompensoj

Ĵaŭde la 21-an de decembro, la honkonga justico ordonis al hejmpatrino 46-jara, jam kondamnita al ses jaroj de malliberejo en 2015, pagi al sia eks-hejmlaboristino, pli ol 100 000 dolarojn, t.e la tuton el la damaĝkompensoj, kiujn postulis la viktimo. La afero de tiu sklavigita hejmlaboristino estigis grandan tumulton, kaj malkaŝis la sorton suferitan de miloj da virinoj en la mondo.

Tio estas granda venko por Erwiana Sulistyaningsih, tiu juna indonezianino aĝa hodiaŭ je 25 jaroj, kiu de du jaroj postulas kompenson ĉe tribunalo pro la nehumana kaj malnobliga traktado, kiun ŝi suferis, kiam ŝi laboris en honkonga familio.

La hejmlaboristino ja eltenis veran martiriĝon. Ŝia mastrino jam estis kondamnita en 2015 je ses jaroj da malliberejo pro batoj, gravaj vundoj kaj minacoj.

Per multaj detaloj, Erwiana tiam rakontis pri la batoj, la manko de nutraĵoj, la mallongaj noktoj de dormado, kaj aliaj mistraktadoj, ĝis kiam ŝi sukcesis fuĝi kaj atingi Javon.

Honkongo enkalkulas ĉirkaŭ 300 000 hejmlaboristinojn, plejparte venintajn de Filipinoj kaj Indonezio.

Tiuj izolitaj virinoj ĝenerale estas pli bone protektataj tie, ol en aliaj landoj de Azio aŭ Mez-Oriento, kvankam ili multe dependas de sia dunginto.

Tiuj, kiuj defendas iliajn rajtojn deziras ke la aranĝo, kiu devigas la dungintojn gastigi sian hejmlaboristinon, estu abolita. Tio povus protekti la viktimojn kontraŭ eventualaj ekscesaj dungintoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Israelo sin retiros el Unesko

Israelaj amaskomunikiloj raportis sabate [23 dec 2017], ke Israelo retiros sin el Unesko antaŭ la fino de 2017.




Ĉefministro Benjamin NETANYAHU vendrede [22 dec 2017] instrukciis la reprezentanton de Israelo al Unesko formale iri el la organizo antaŭ la 31-a de decembro. Proparolanto de la Israela Ministerio de Eksterlandaj Aferoj diris, ke Israelo faris la decidon pro tio, ke Unesko intencis apartigi la judan historion disde la israela teritorio.

Iu israela altranga oficialulo diris, ke se Unesko kondukos reformon kaj ŝanĝos sian sintenon pri Israelo antaŭ la fino de la venonta jaro, Israelo retiros sian decidon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Kristnaskaj Paĉjoj are bicikladis

La projekto nomata "Mia patro estas Paĉjo-Kristnasko" estis elpensita de la organizo pri socia solidareco de la urbodomo de Katanduvo, subŝtato San-Paŭlo, Brazilo, kaj konsistis el biciklaj promenadoj tra la kvartaloj – merkrede kaj vendrede de la 8-a ĝis la 22-a de decembro – kies volontulaj partoprenintoj plenumis la veturadojn vestitaj kiel Kristnaskaj Paĉjoj.



Kiuj partoprenis ĉiujn veturadojn, tiuj gajnis biciklojn, krom la vestaĵojn. Entute estis 225 bicikloj donacitaj de komercistoj kaj aliaj entreprenistoj al la projekto. Ne nur viroj partoprenis la bicikladojn, estis ankaŭ multaj "kristnaskaj panjoj" en la okazintaĵoj.

Je ĉiu veturado la paprtoprenintoj ricevis po unu sigelon, kies plena kolektado garantiis la biciklojn al ili. "La biciklon mi donacos al mia plej aĝa filino", tion diris la elektristo André Luiz DE CARVALHO, partopreninto de la bicikladoj.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Submaraj kabloj por savi la vivon

Imagu ke tra la tuta ocean-fundo oni instalus, je ĉiu 60-a kilometro, mediajn datumsensilojn, kiuj faciligus koni danĝerajn naturfenomenojn kiel cunamoj kaj klimataj ŝanĝiĝoj. Danke al la projekto SMART, tiu ĉi reto de datumtransmisio en reala tempo kapabla mildigi la efikojn de la naturaj katastrofoj, povus baldaŭ esti realo.

Pli ol miliono da kilometroj de submaraj kabloj formas la dorsan spinon de la monda telekomunika infrastrukturo, nepra por komerco, financoj, funkciado de la sociaj retoj kaj Interreto kaj por certaj distraj, politikaj kaj sciencaj agadoj. La fidindeco e tia infrastrukturo ege gravas ĉar, se ĝi havus problemojn, tiam estos damaĝo al ĉiuj ekonomioj de la mondo.

Tiuj samaj submaraj kabloj povus taŭgi por kolekti datumojn pri la profundaj akvoj kaj la marfundo, alportante informojn pri mediaj aferoj tre gravaj. Endas ne forgesi ke la oceanoj kaj la klimato de nia planedo suferadas pro ŝanĝoj kiel varmiĝo, acidiĝo kaj altigo de la marnivelo, kio koncernas nin ĉiujn ĝuste nun kaj ankaŭ fronte al la estonto.

Ĉiu norma sistemo de telekomunikoj estas formata de elektro-optika kablo lokita en la oceanfundo kaj ekipita per optikaj ripetiloj instalitaj je intervaloj de 60 kilometroj. Se al tiuj ripetiloj oni aldonus mediajn sensilojn, ni havus aliron, en reala tempo, al monda provizreto de utilaj datumoj por mastrumi la mediajn riskojn kaj mildigi iliajn efikojn.

Posedi sistemojn de frua atentigo kontraŭ tsunamoj povus savi multajn homajn vivojn, ĉefe en evolulandoj kie ne eblas certigi servkovradon de ĉiuj subdukci-zonoj. Ĉar ofte la marondoj de cunamoj atingas la marbordojn ene de malpli ol 30 minutoj post kiam okazis sismo en la maro, eĉ minuton oni ne perdu.

Por konkretigi tiun ĉi ideon, la Internacia Unuiĝo de Telekomunikado (IUT), la Oceanografia Interregistara Komisiono de Unesko (OIK-Unesko) kaj la Monda Meteologia Organizo (MMO) kune kreis en 2012 Miksan Specialan Grupon IUT/MMO/ OIK-Unesko por esplori la eblecon aldoni mediajn kontrolsensilojn al la submaraj retoj de transoceanaj kabloj de telekomunikado.

**Internacia Iniciato**

La iniciato, nomata "Kabloj SMART" ("*Scientific Monitoring And Reliable Telecommunications*" – Scienca Observado kaj Fidindaj Telekomunikoj) celas profiti la vastan reton de submaraj kabloj jam instalitaj por ilin transformi en "verdajn kabloj", kongruaj kun la konservado de la

medio.

La laboro entreprenita de la Grupo estas aŭtente internacia, tiel ke ĝin formas spertuloj el dekkelkaj landoj - multaj el ili volontuloj - kaj 80 organizoj kiuj reprezentas sciencistojn, mastrumantojn de observsistemoj, entreprenistojn, registarajn instituciojn kaj diversajn patronojn. La grupo turnas sin al registaroj, sciencistoj, filantropaj fondaĵoj, entreprenoj de la privata sektoro kaj ĉiuj kiuj uzas la interreton, por ke ili ekkonsciu la bezonon instali tiun sistemon kaj la eksterordinarajn eblojn kiujn ĝi proponas kaj ankaŭ por ke ili agu konforme kun la celo ĝin realigi.

Aliro al la profundaj akvoj kaj marfundoj, nepra por instali SMART-kablojn, estas preskaŭ en la manoj de la privata sektoro. Krome, la kabloj etendataj tra la oceanaj fundoj de la mondo trairas diversajn naciajn landlimojn, kio kaŭzas serion da teknikaj, juraj kaj financaj komplikoj.

Pro tio estos necese starigi kunlaborajn interkonsentojn tre eksterordinarajn, por ke la projekto “SMART-kabloj” konkretiĝu. Se la projekton partoprenus entreprenistoj de la privata sektoro, kune kun la provizantoj de Interreta aliro, kiuj de antaŭnelonge investas en submaraj kabloj, rekte solviĝus aferoj financaj kaj juraj, same kiel permesproceduroj.

**Kreskanta interkonsento**

Danke al serio da kunsidoj kaj atelieroj komunaj de respondeculoj de la sektoro de telekomunikado kaj sciencistoj el universitatoj kaj registaraj institucioj, formiĝadas interkonsento kreskanta pri la bezono forigi la obstaklojn alfrontatajn de la SMART-sistemoj. Oni ekdokumentas la bezonojn de la scienca komunumo kaj la civila socio, kaj jam estas ellaboritaj studo pri teknika fareblo kaj jura kadro, kiu kongruas kun la dispozicioj de la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Maro.

Nuntempe, nur parto de la telekomunikaj kabloj uzatas por sciencaj celoj. Ekzistas, kompreneble, observ-sistemoj de la oceana medio, kiuj apartenas al universitatoj kaj registaraj institucioj ekspluatantaj ilin, sed ili kovras nur mallongajn distancojn kaj uzatas por sciencaj esploroj konkretaj.

Jam ekzistas projekta dezajno de demonstra prototipo en akva medio taŭga por esti funkcipova je meza tempolimo kaj montri kiom efika kaj praktika estas la SMART-sistemo. Same, oni proponis instali kontrolsistemon kiu konektu kelkajn insulojn de la Pacifiko-sudo.

Tie, la atingaĵoj teknologiaj ebligos aldoni bazajn sensilojn al la ripetiloj de la submaraj telekomunikaj kabloj je intervaloj de 50 ĝis 70 kilometroj, tre malaltkoste kompare kun tiu postulata por instalado de nova kabla reto. Instali kaptilon kostas 200 000 dolarojn proksimume, kaj pro ĝiaj limigitaj dimensioj, la kosto de la test-sistemo proponita ne atingus 10 milionojn da dolaroj, modesta sumo por io kio povus vivdaŭri ĉirkaŭ 25 jarojn.

Nuntempe, ne ekzistas submara telekomunika reto kiu prikonsideru la bezonon savgardi la oceanon. La datumoj pri la profundaj akvoj disponigitaj de la SMARTkabloj povus plenigi la gravan lakunon de niaj scioj pri la oceanoj. Jam tempo por komenci la estontecon kaj starigi per la sistemo SMART.

Bruce HOWE kaj Kate PANAYOTOU
Tradukis: Maritza GUTIERREZ
Unesko-Kuriero 2017, n-ro 3

# Antaŭkristnaska vespero

Legante iomete en ĵurnaloj kaj tra interreto pri eventoj rilataj al Kristnasko, mi trovis, denove, la belan historion de la “militpaŭzo” de 1914. Tiam mi decidis verki tiun artikoleton por rakonti, tre mallonge, kio okazis dum la vespero antaŭ la tago de Kristnasko ĉe la Okcidenta fronto dum la Unua Mondmilito, en kelkaj lokoj de la nuna Belgio. Eble ne ĉiuj konas tiun belegan kaj kuriozan eventon.



Okazis, ke dum tiu malproksima vespero, kelkaj taĉmentoj de soldatoj el Germanio kaj Britio decidis, tute sponte, ne pafi nek batali dum antaŭkristnaska vespero kaj dum la tago de Kristnasko. Homoj el ambaŭ armeoj renkontiĝis, kantis kristnaskajn kantojn, parolis, babilis, interŝanĝis donacojn, kaj eĉ ludis futbalan matĉon. Tiu militpaŭzo estis ankaŭ farita en kelkaj aliaj lokoj tra la okcidenta flanko de la milito.

Tiu mirinda okazaĵo estis rememorata multajn fojojn, kutime okaze de Kristnaskan Festojn, per rakontoj, noveloj, kanzonoj, filmoj kaj komercaj reklamoj.

Eĉ oni decidis okazigi futbalan matĉon por celebri la unuan jarcenton de tiu admirinda okazaĵo. La du teamoj, kiuj ludis tiun rememorigan matĉon estis formitaj per membroj de la nuntempaj germana kaj brita armeoj.

Bedaŭrinde, en 1914 la komandantoj de la armeoj koleris pro tiu evento kaj faris tiom, kiom estis eble por ke ĝi neniam okazu denove. Kaj, fakte, ĝi neniam reokazis. Ŝajnas, ke tiuj kiuj regas la vivon de homoj preferas militon antaŭ ol pacon. Trista mondo.

Kaj tio estas, kurtigite, la bela kaj samtempe trista historio de la "Kristnaska militpaŭzo" de 1914. Mi esperas, ke vi ŝatis ekkoni tiun kuriozaĵon.

Fonto: pacamondo.blogspot.com

Neniam Milito Inter Ni



## Alejo Carpentier

**Alejo Carpentier [aleĥo karpentjer’] (naskiĝis la 26-an de decembro 1904 en Havano, mortis la 24-an de aprilo 1980 en Parizo) estis romanisto, eseisto kaj muzikologo kuba; li influis elstare la latinoamerikan literaturon dum la 1970-aj jaroj.**

**Vikipedio**